Giacomino Martinez

# Preĝejoj
# en la urbo Trapani
# kun mallongaj priskribaj sciigoj

Fervojista Postlaboro - Udine
Nova Espero Friuli
2019

# ANTAŬPAROLO

Ne ofte oni okazas halti admiri kaj viziti preĝejon kaj pensi pri tiuj niaj artistoj, kiuj donis prestiĝon al la urbo. Nomoj pri artistoj ne ĉiam lernitaj en lernejo kaj malfacile niaj pensoj, okupitaj de la ĉiutagaj necesoj, igis nin scivolaj por koni almenaŭ pri kiu temas.

Nia urbo estas riĉa je artaĵoj kaj tiu skribo estas nur rimedo por ke trapanianoj, sen esti surloke, povu admiri ilin kaj zorgu pri la artaj riĉaĵoj, kiuj ilin ĉirkaŭas.

La skribo rilatas precipe la eksteran parton pri ĉiu preĝejo, pri kiu estas skribitaj, por kono je ĝenerala karaktero, sciigoj kiel provizo de la bildoj.

Ĉi tiu skribo estas je kompletigo de aliaj laboroj titolitaj *Monumentoj kaj memorŝtonoj en la urbo Trapani kun biogtrafiaj kaj historiaj sciigoj* kaj *Palacoj en la urbo Trapani kun mallongaj priskribaj sciigoj.*

Giacomino Martinez

GLOSARO
(Vortaro “Lo Zingarelli 1998”)

| | |
|---|---|
| ABSIDO | Parto de la kristana preĝejo je plano duoncirkla aŭ poligona, kovrita per volbo; ĝi estas metita funde de la ĉefa navo kaj, iafoje, de la flankaj. |
| FRESKO | Tekniko pri murpentrado farita sur freŝa stuko per koloroj diluitaj en pura akvo. |
| ALTARO | En la katolika preĝejo, liturgia tablo sur kiu la sacerdoto celebras la mesoferon. |
| ĈEFALTARO | Tiu ĉefa, lokita precipe en la absido. |
| ARKITEKTURO | Arto aŭ tekniko projekti kaj konstrui palacojn aŭ aliajn konstruaĵojn. |
| ARKITRAVO | Elemento de la entablemento, kiu apogas sur la kapiteloj de la kolonoj, la pilastroj aŭ la fostoj, kaj estas altiĝita de la freto. |
| | Arkitektura elemento horizontala, komence el ligno, poste el ŝtono, apogita sur du subtenaj elementoj (kolonoj, pilastroj). (*) |
| BALDAKENO | Kronaĵo el marmoro, ŝtono aŭ bronzo uzita por konkoj, mezepokaj tomboj kaj tabernakloj enhavantaj la hostiujon. |
| BUSTO | Skulptaĵo plenforma reprezentante homan bildon de la kapo ĝis la talio, sen la brakoj. |
| KAPITELO | Supera parto de la kolono aŭ de la pilastro, kie apogas la arkitravo aŭ la arko, havante dekoracian funkcion. |
| ĈEVRONO | Triangula subtena strukturo por dekliva tegmento, farita de traboj el ligno, fero aŭ ferbetono. |
| | Strrukturo el ligno, fero aŭ ferbetono klinfloke, kies ekstremoj apogas sur la subtenaj muroj aŭ sur pilastroj, kapabla subteni la tegmenton de konstruaĵo. Ĝia funkcio estas aldirekti la pezon de la tegmento sur la subtenoj. (*) |
| KLOSTRO | Monaĥeja korto, ĉirkaŭita per portikoj, lokita iafoje ankaŭ ĉe la flanko de katedraloj. |
| KOLONO | Arkitektura elemento vertikala je cirkla sekco, kun subtena funkcio aŭ se almetita al muro aŭ al pilastro, kun dekoracia funkcio. |
| | Arkitektura elemento cilindra, farita de pluraj tamburoj (aŭ rokoj) el ŝtono aŭ marmoro kun funkcio de subteno aŭ ankaŭ nur dekoracia. La klasika kolono estas farita je tri partoj: bazo, fusto (simpla aŭ kanelita), kapitelo. Fusto kaj kapitelo ŝanĝas laŭ la ordoj kaj la stiloj. Kune kun la arkitravo, la kolono estas la subtena sistemo de konstruaĵo kaj ĝi estas la arkitektura derivado de la primitiva paliso el ligno. (*) |
| KVADROŜTONO | Ortangula ŝtono je formo pli-malpli regula antaŭvide al ĝia utiligo en konstruaĵo, precipe en la eksteraj dekoracioj. |
| | Elemento el ŝtono aŭ terakoto uzita en la masona konstruaĵo. Laborita kojnoforme, ĝi estas la baza elemento dum la konstruo de la arko. (*) |
| BRETO | Arkitektura strukturo elstaranta el vertikala surfaco por subteni unu aŭ pluraj supraj strukturoj. |

| | |
|---|---|
| NAVO | Interna spaco de konstruaĵo de bazilika tipo, specife de preĝejo, entenita inter du laŭlongaj vicoj de kolonoj aŭ de pilastroj. |
| KONKO | Kavo farita en la muro, semicirklaforme je vertikala akso, kun dekoracia funkcio en la konstruaĵoj. |
| ANTAŬALTARA PANELO | Ornato, kiu kovras la antaŭan parton de la krista palaco, el ŝtofo, ligno, marmoro, erburo aŭ multevaloraj materialoj variornamitaj. |
| PORDO | Enireja aperturo konsistita de du pilastroj, diritaj pilieroj kaj de arko aŭ supera arkitravo. La aperturo estas fermita de unu aŭ du klapoj el ligno aŭ alia materialo. (*) |
| PORTALO | Pordego de preĝejoj aŭ palacoj kun dekoracioj kaj ornamoj.<br>Solena enirejo de preĝejo, de palaco, ĝenerale ornamita per skulptaj partoj. (*) |
| SACERDOTEJO | Parto de la preĝejo ĉirkaŭantan la ĉefaltaron, plialtigita per kelkaj ŝtupoj kaj ĉirkaŭbarita per balustradoj, rezervita al la oficianta pastraro. |
| ROZONO | Ronda vitralo kun radiantaj motivoj, rozforme aŭ radforme kaj ĝenerale el marmoro, lokita supre la centra porto fasada de la romanikaj kaj gotikaj preĝejoj, por lumigi la centran navon. |
| STATUO | Skulptaĵo plenforma, reprezentante personon, beston aŭ personigitan aĵon. |
| TIMPANO | Triangula spaco, entenata inter la kadro kaj la du deklivoj de la frontono. |
| ENTABLEMENTO | Horizonta strukturo, karakteriza de diversaj arkitekturaj ordoj, subtenita de kolonoj, kiu konsistas de la arkitravo, de la freto kaj de la kadro. |
| TRANSEPTO | En la kristana preĝejo je plano laŭlonga, navo lokita transverse la ĉefan akson de la preĝejo mem. |
| VOLBO | Kurba surfaco, kiu kovras medion malaperta aŭ aperta, duonsferforme aŭ duoncilindraforme, laŭ la medio havas cirklan aŭ rektangulan planon. (*) |
| VOLUTO | Arkitektura ornamo spiralforme, kiu estas parto de la ionika kapitelo. |

(*) Italaj kasteloj kaj palacoj. Selezione dal reader's digest, Milano, 1983.

**1 -** Preĝejo  Sankta Maria Tre Sankta de Kustonaĉi, strato Kustonaĉi n.ro 39.







Starigita en la XVI jarcento, ĝi estis pliiĝita en 1625. La altaro estis altiĝita per pentraĵo prezentanta Madonon de Kustonaci datita 1520. La preĝejo estis rekonstruita en 1817 sekve de la eksplodo de la festaj preparoj privataj de iu Simono Filippella (_____ - _____). La domo de Filippella estis laŭvorte eksplodita kaj ĝi treniĝis multenombre da aliaj domoj kaj ankaŭ la malgrandan preĝejon Madono de Kustonaĉi.

**2 -** Preĝejo Sankta Lucia aŭ Maria Tre Sankta de la Ĉeno, strato Sankta Anna.





Starigita en la XIV jarcento de koralfiŝistoj de la antikva kvartalo “Palaco” ĝi suferis diversajn modifojn. En 1873 estis realigita la portalo je baroka stilo. Parto el la interna pavimo el fajenco estas gardata en la Regiona Muzeo Pepoli. Ĝi akceptis la Societon de Koralistoj.

**3 -** Preĝejo kaj Monakejo Kapucenoj (dirita Epifanio), strato Kapucenoj n.ro 6.




Starigita en 1619 de Kapucenoj. Tie estis aligita monakejo kun granda ĝardeno kaj la marzono por la fiŝado. La fasado karakterizaĝas per la granda portalo, lokita sub la nuna nivelo de la strato. La interno estas ununava. Nune la preĝejo ne estas alirebla. La antikva monakejo estas kontraŭe restrukturita. Oni povas admiri grandan relikvujon sur la ĉefaltaro, la statuon al Sankta Lucia (1704) de Jozefo Tartaglia - Tartalja (___ - ___), la pentraĵon al Madono de Trapani kun sankta Alberto de Jozefo Felice (Trapani, ___1661 – tie, 24 julio 1734). En la preĝejo estas la tombo de la skulptisto Antono Nolfo (Trapani, ___1696 – tie, ___1784). De longe fermita al la kredo, la statuo al Sankta Lucia, kiu oni veneris antaŭe en la preĝejo Sankta Anna, nune estas en la preĝejo Sankta Francisko el Asizo.

**4 -** Preĝejo Sankta Liberale, placeto Sankta Liberale.




Starigita de la trapaniaj koralfiŝistoj ĉirkaŭ la jaro 1600, kiel eks voto, ĝi estas dediĉita al Martiro, buĉita apud Kartago por ne malkonfesi la kredon je Kristo. Kelkaj trapaniaj maristoj, kiuj antaŭeniĝis ĝis la kartegaj akvoj, kie okazis la martiriĝo, fiŝis tiom da koralo, ke ili tion atribuis la meriton al la senkulpa sango de Martiro. Reveninte al Trapani, fiŝistoj elŝipigis la altvaloran ŝarĝon en ĉi tiun lokon kaj ĉi tie ili volis starigi la preĝejeton honore al Sanktulo. Ĝi estas ĉe la ekstrema pinto de la falĉilo, en la apudeco de Turo de Ligny.

Eksterne ĝi estas realigita el tofo de Favinjana, ene ĝi estas tute refarita kaj ĝis nun ĝi estas malfermata al la kredo. Oni tien aliras per ŝtuparo antaŭ ne longe konstruita, en la kadro de unu el la plej agrablaj panoramoj en Sicilio. La okdekjarcenta fasado, kiu konseviĝis parte ĝis antaŭ jartrideko, estis rekovrita per stuko por kaŝi la progresinta situacio de korodo.

**5 -** Preĝejo Maria ĉiam Dolora Virgino, korso Viktorio Emanuelo n.ro 133.






Je ununava kun flankaj kapeloj, ĝi estis starigita en 1633 laŭ la volo de sinjorino Maria Napoli de Omodei (___ - ___), laŭ la projekto de arkitekto don Petro Castro (Trapani, ___1638 – tie, ___1694). Ene ĝi sin karakterizas per la ĉefaltaro kaj kvar altaroj de la flankaj kapeloj. El la artaĵoj garditaj ligna Krucifikso (XVII[a] jarcento) de Kristoforo Milanti (Trapani,___post 1655 - ___). Tie estas la tombo de Tereza Fardella De Blasi (Nov-Jorko, 24 majo 1867 – Trapani, 26 aŭgusto 1957), fondantino de la Kongregacio de la “Malriĉaj filinoj de Maria Tre Sankta Kronita” ĉiam daŭraj adorantinoj de la Sakra Koro de Jesuo.

**6 -** Preĝejo Sankta Laŭrenco Martiro (Katedralo), korso Viktorio Emanuiele n.ro 36.

La preĝejo starigis en la antikva kvartalo nomita “Palaco”, en la loko okupita ekde la jaro 1102 de la kapelo sankta Georgo, patrono de Ĝenovanoj. En 1433 reĝo Alfonso V de Aragono, la Grandanima (Medina del Kampo, Hispanio, 24 februaro 1396 – Napolo, 27 junio 1458) elpelis Ĝenovanojn kaj la postan jaron li konsideris Parokon sankta Laŭrenco. Per la prebendoj de la riĉaj familioj trapaniaj, estis starigitaj la kapeloj interne la preĝejo kaj unue el ĉiuj en 1434 tiu honore al sankta Stefano pere de familio Vento. La Preĝejo estis poste restrukturitra kaj pliigita. En 1602 parokestroj havis la permeson de Episkopeco de Mazara de la Valo, kies jurisdikcio apartenis sankta Laŭrenco, vendi kelkajn propraĵajn domojn, por subvencii la restaŭradon ne plu prokrastebla, ĉar la konstruaĵo riskis fali de unu momento la alian. En 1603, ankaŭ per la helpo de la popolaj almozoj, komenciĝis la konstruaj laboroj de la absido. En 1639, aĉetitaj kelkajn domojn propraĵoj de Ĝenovanoj apudaj la preĝejo, oni prizorgis doni la hodiaŭan aranĝon je tri navoj sur kopulaj kolonoj, laŭ la projekto de la mesina arkitekto frato Bonaventuro Certo - Ĉerto (Mesino, ___1586 – Trapani, ___1650). Sed la arkitektona artaĵo de la preĝejo estis finita je jarcenta intertempo (1740) de la Trapani-a arkitekto pastro Johano Blazo Amico (Trapani, 3 februaro 1684 – tie, 3 septembro 1754). Fakte, arkitekto Amico, faris la desegnaĵojn de la flankaj kapeloj, de la kupolo kun kvar flankaj kapeloj, de la ĥorejo, de la portiko kun tri grandaj arkoj, de la fronto kun la balustrado, de la kampanilo kaj de la aligitaj ejoj. La laboroj okazis dum jardekvino, ekde: 1734 (Kapelo de la Sakramento kaj Kupolo), 1736 (Kampanilo), por fini: 1748 (Portiko antaŭ la enirejo) kaj do la supera parto de la fasado. Ĝi estis konsekrita kaj levita kiel Katedralo per la institucio de la Dioceco de Trapani la 31an de majo 1844 per buleo de Gregorio XVI (Belluno, 18 septembro 1765 – Romo, 1 junio 1846). La preĝejo je tri navoj, kun 14 marmoraj kolonoj, estas dekoraciita per stukaĵoj de la palermaj Hironimo Rizzo - Rico (___ - ___) kaj Honofrio Noto (___ - ___), dum la freskoj de la volbo estas laboroj de Vincento Manno (Palermo, ___1750 - tie___1821), kiu tie laboris inter la jaroj 1796 kaj 1802. La interno estas je tri navoj kaj ĝi gardas, interalie, pentraĵon atribuita al la flandra pentristo Antoon van Dyck (Antverpeno, 22 marto 1599 – Londono, 9 decembro 1641), kiu prezentas la Krucumon (XVII jarcento), la Martiriĝon de sankta Laŭrenco de Jozefo Felice - Feliĉe (Trapani, ___1661 – tie, 24 julio 1734), Eternan Patron de Dominico La Bruna (Trapani, 24 februaro 1699 – tie, 9 junio 1763), sanktan Georgon kaj la drakon de Andreo Carrera - Karrera (Trapani,___1606 - Palermo, 13 februaro 1677) kaj la mortintan Kriston el loka ŝtono, dirita “karnokolora”, de Jakobo Tartaglio (Trapani, ___1678 – tie, 19 aprilo 1751). En 1716 estis decidita la aĉeto de orgeno. La preĝejo estas kunlegata, per superpasejo farigita en 1964 laŭ la iniciato de L.M. espiskopo Francisko Ricceri (Biankavilla, Katanja, 20 aprilo 1903 – tie, 28 julio 1980), kun la Episkopejo lokita en du apudaj palacoj de la XVIII jarcento. En 1967 estis inaŭgurita la nova orgeno, kun ĉirkaŭ 3.000 tuboj, konstruita de la firmo Fratoj Ruffati el Padovo, volita de mons. Francisko Ricceri. La krado, el bronzo kaj fero, lokita kiel fermo de la tri arkaĵoj de la portiko el kiuj oni eniras la Katedralon, laboro de skulptisto Ennio Tesei (Romo, 18 oktobro 1934 – tie, 19 septembro 2009), inaŭgurita la 29an de junio 1990, anstataŭis tiun malnovan el ligno, jam eluziĝita de la vetero. En ĝi estas enmetitaj kelkaj paneloj el bronzo modeligitaj altereliefe, simobolantaj momentojn el la krista liturgio. Ene la pronao, supre la centra pordo, estas la duonbusto el ŝtono de reĝo Alfonso V de Aragono, la Grandanima, memore al la konsidero kiel paroko sankta Laŭrenco; en la okcidenta parto estas marmora bareliefo de Jozefo Nolfo (___ - ___), prezentanta la Kripon kaj en la orienta parto la statuo al sankta Francisko el Paola.

En 1994 estis enmetita memorŝtono, kun bronza bareliefo de Johano Paŭlo II (Wadowice, Pollando, 18 majo 1920 – Vatikano, 2 aprilo 2005), farigita de artisto Henriko Manfrini (Lugo, Ravenna, 27 marto 1917 – Milano, 16 majo 2004) por memorigi la viziton de la papo al la Katedralo la 8an de majo 1993. En 1995 komenciĝis la restrukturadajn laboroj volitaj de mons. Dominico Amoroso (Mesino, 24 oktobro 1927 – Trapani, 18 aŭgusto 1997), sub la direkto de arkitektino Karmela Rinaudo (n. Trapani, 4 oktobro 1956).

**7 -** Preĝejo Maria Tre Sankta Senmakula, Kolegio kaj Konvento de Jezuitoj, korso Viktorio Emanuelo n.ro 12 – angulo strato Romo.



La templo, kun ĝiaj imponaj konstruaĵoj kaj la granda klostro de la kolegio, estis starigita en la XVII jarcento de Jezuitoj, alvenintaj al Trapani en 1581. La arkitektona konstruaĵo situas en areo limigita de korso Viktorio Emanuelo kaj, kun stratoj Manĉina kaj leŭtenanto Ĝenovese, finiĝas en strato Romo. En 1596, profiti je donacoj de la Senato kaj de Mariano Mongiardino (___ - ___), Jezuitoj kavis la permeson starigi la preĝejon. Al la preĝejo estis aldonita la kolegio. La preĝejo, projektita en 1614 de la mesina arkitekto Natale Masuccio (Mesino, ___1568 – tie, ___1619) - sed la fronto de la preĝejo estis farita de la trapania inĝeniero Francisko Pinna (___ - ___), estas unu el la plej signifaj barokaj monumentoj en la urbo. La fasado (1657), desegnita de Francisko Bonamici (___ - ___), estas atribuita al Tomaso Blandino (___ - ___). La interno, je tri navoj, havas kolonojn kaj duoncirkla arkoj kaj estas riĉe dekoraciita per mikskoloraj marmoroj, laŭ la modelo de la palermaj barokaj preĝejoj. La volbo (XVIII jarcento) estas beligita per stukaĵoj de Bartolomeo Sanseverino (___ - ___), skolano de la fama Jakobo Serpotta (Palermo, 10 marto 1656 – tie, 27 februaro 1732). La preĝejo estas dediĉita al la Senmakula Koncipiĝo. Sur la ĉefaltaro pentraĵo (1771) de Ignaco Morabiti (Palermo, 6 januaro 1719 – tie, 10 januaro 1797) prezentas la Senmakulan Koncipiĝon kaj en la flankaj kapeloj la pentraĵo al Sankta Ignaco el Loyola, fondinto de la Societo, de Gulielmo Borremans, Gulielmo Borromanzi dirita la Germano (Antverpeno, ___1672 – Palermo, 17 aprilo 1744) kaj Sankta Francisko Saverjo de Petro Novelli (Monreale, Palermo, 2 marto 1603 – Palermo, 27 aŭgusto 1647). En la XVIII jarcento estis realigita de arkitekto Johano Blazo Amico (Trapani, 3 februaro 1684 – tie, 3 septembro 1754) la kapelo al Sankta Ignaco el Loyola, maldekstre de la absido. La pentraĵo prezentas la Sanktulon je la momento ricevi de anĝelo la inspiron fondi lian Societon. En la sakristio estas gardataj la marketritajn lignajn ŝrankojn de Petro Orlando (___1651 - ___1699), ligna Krucumo de Jozefo Milanti (Trapani, ___duono XVII jarcento - ___ komenco XVIII jarcento), pentraĵo al Sankta Ignaco de Vito Carrera - Karrera (Trapani, ___1555 – tie. ___1622). Ĝi estis konsekrita de Episkopo de la diocezo de Mazara de la Valo, la ĝenova Kardinalo Johano Dominico Spinola (Ĝenovo, ___1580 – Mazara de la Valo, Trapani, 11 aŭgusto 1646) la 13an aŭ 16an de junio 1638, sed la laboroj por la kompletigo de la monumenta konstruaĵo daŭris ĝis la jaro 1778. La preĝejo estas malfermita al la kredo de la jaro 1960. La kolegio hodiaŭ estas sidejo de la Klasika Liceo “Leonardo Ximenes” kaj la Domo antaŭe estis destinita al tribunalo.

Per Reĝa Dekreto de la 13a de novembro 1767 la patroj de la Societo de Jesuo estis elpelitaj el la Regno de la Du Sicilioj (Vicreĝo markizo Johano Fogliani Sforza de Aragono – Plaĉenzo, 3 oktobro 1697 – Kastelnuovo Fogliani, Plaĉenco, 10 marto 1780). La 30an de julio 1804 papo Pio VII (Ĉesena, 14 aŭgusto 1742 – Romo, 20 aŭgusto 1823) aprobis la ekziston de la jezuita Ordeno ankaŭ en Sicilio kaj, dek jarojn poste, li restarigis la Societon de Jesuo en ĝia origina stato.




Kolegio, sidejo de la klasika Liceo “Leonardo Ximenes”

**8 -** Preĝejo kaj Konvento Sankta Johano, strato Libereco n.ro 10.






La preĝejo estis konstruita de Jerusalemaj Kavaliroj eble dum la tempo de la unuaj krucmilito. En 1607 ĝi estis cedita al Filipanoj. La 15an de februaro 1641 la volbo de la preĝejo suferis falon, kiu kaŭzis multajn mortintojn. En 1645 la preĝejo estis restrukturita kaj modifita laŭ la projekto de arkitekto pastro Bonaventuro Certo (Mesino, ___1586 – Trapani, ___1650). La preĝejo estis fermita al la kredo en 1866, la ejoj de la konvento estis ceditaj al la Komunumo kaj destinitaj al lernejo (Unuagrada Ŝtata Lernejo “Johano Verga”).

**9 -** Preĝejo de Karmelo, strato Libereco n.ro 1 - angulo strato Torrearsa.













Flanko strato Torrearsa

La preĝejo, dediĉita al sankta Maria de Monto Karmelo, estis starigita ĉe la fino de la XVI jarcento (ĉirkaŭ 1575-1600) de Karmelanoj, apud pordego Felice, sur antaŭekzistanta konstruaĵo. Apude estis la konvento, kiu estis kunigita kun la preĝejo post la aĉeto de najbaraj domoj (1451). En 1651 la konstruaĵo estis renovigita kaj estis enmetitaj la du kolonoj realigitaj de Jakobo Diolivolsi (___ - ___). La preĝejo havas rimarkindan historian gravecon, ĉar, kiel indikas la skribaĵo lokita angule inter la stratoj Libereco kaj Torrearsa en ĝin oni lokis ekde la jaro 1587 "la statuon al Madono de Trapani, gardita en la sanktejo de la Anunciacio, en la tuja proksimeco de milito". La fasado estas tre simpla, skandata per korintikaj duonpilastroj kaj je renesanca gusto; supre la enira portalo estas konka fenestro, lintela, al kiu respondas similaĵo, supre la kadro. Ankaŭ ene ĝi sin prezentas laŭ formoj tarda renesancaj; la ununavo je barelforma kovro kaj flankaj altaroj laŭlonge la muroj, etendiĝas laŭ oblikva akso, kiu sekvas la iron de la flanka strato. Tie oni gardas artaĵojn: Asunciono, de Jozefo Felice (Trapani, ___1661 – tie, 24 julio 1734), Madono de Trapani, XVIII jarcento, de Dominico La Bruna (Trapani, 24 februaro 1699 – tie, 9 junio 1763) kaj skulptaĵojn: Madono de Karmelo, de Jakobo Tartaglia (Trapani, ___1678 – tie, 19 aprilo 1751), Krucifikso, XVII jarcento, de Petro Orlando (___1651 - ___1699), Kristo ĉe la Kolono el loka ŝtono, XVIII jarcento, de Alberto Tipa (Trapani, 10 julio 1732 – tie, ___1783), fresko de la plafono, de Vito Carrera - Karrera (Trapani, ___1555 ĉirkaŭ – tie, ___1622 ĉirkaŭ) kaj Sankta Gaetano, de Jozefo Tartaglia - Tartalja (___ - ___).

**10 -** Preĝejo kaj Monakejo Sankta Maria de la Helpo, dirita Abatejo Nova, strato Garibaldi n.ro 18.







Johano filo de Petro Marteno Catalani - Katalani konstruigis
la hospitalon en la jaro 1303, emigita de lia patrino
Johano Sebastiano el Trapani dirita Anĝelo S.

Pli konata kiel Abatejo Nova el la nomo de la aligita monakejo. La preĝejo, unu el la plej belaj en la urbo, estis starigita en 1461 kaj ĝi situas sur la ruinoj kie estis la preĝejo sankta Sofia je ortodoksa rito, starigita de Belizaro (___, Germanio, ___505 ĉirkaŭ – Konstantinopolo, ___565), generalo de Justiniano (Tauresio, Macedonio, ___482 – Konstantinopolo, 14 novembro 565), en 536 p.K.. Tuj apuda al la preĝejo estis la antikva malsanulejo sankta Anĝelo dirita ankaŭ de Katalunoj. Post refaro de la XV jarcento, ĝi estis tute restarigita ĉirkaŭ la jaro 1640 per la realigo de la monakejo kaj de la preĝejo de domenikaninoj de sankta Katarina. La fronto prezentas klasikimitan portalon surmetiĝita de konko kun la statuo de Madono de la Helpo (1670), artaĵo de Kristoforo Milanti (Trapani, ___post 1655 - ___). La interno, je ununava, estas riĉe

dekoraciita per plurkoloraj marmoroj je pura baroka stilo sicilia. La ĉefaltaro (1740), je empira stilo, estas artaĵo de la trapania Frederiko Siracusa - Sirakusa (Trapani, ___1759 - ___1837). Ĝi estas riĉa je ŝatindaj deksepjarcentaj pentraĵoj, el kiuj du toloj de Andreo Carreca - Karreka (Trapani, ___ 1606 - Palermo, 13 februaro 1677), kiuj prezentas la Ekstazon de sankta Katarina, kaj sanktan Tomason el Akvino kaj sankta Dominico de Petro Novelli (Monreale, Palermo, 2 marto 1603 – Palermo, 27 aŭgusto 1647), la pentraĵo de Madono de Rozario de Gulielmo Borremans dirita la Germano (Antverpeno, ___1670 – Palermo, 17 aprilo 1744). Al Johano Blazo Amico (Trapani, 3 februaro 1684 – tie, 3 septembro 1754) oni atribuas la altaron de Madono de la Helpo (XVIII jarcento). Jakobo Pepe (___ - ___), trapania patricio, ĝin riĉigis per liaj donacoj. La monakejo hodiaŭ estas sidejo de la eks Financoficejo.

**11 -** Preĝejo Karmeleto (Sankta Jozefo), strato Garibaldi n.ro 24.





Reiranta al la XVIII jarcento, starigita de la Societo sankta Maria de Karmelo. En 1789 estis fariĝita kaj dekoraciita la ligna ikono de la ĉefaltaro kaj la altaro mem. Ene estas gardataj pentraĵo de Jozefo Errante (Trapani, 19 majo 1760 – Romo, 16 februaro 1821) prezentanta la Forpason de sankta Jozefo, kaj ligna, tola kaj glua statuo de sankta Jozefo, artaĵo de Antono Nolfo (Trapani, ___1696 – tie, ___1784).

**12 -** Preĝejo Sankta Alberto, strato Garibaldi n.ro 68.






Ĝia konstruo reiras al 1681, sed ĝi estis finita en 1700, fare de la pastra kongregacio, sub la titolo sankta Alberto. Je centra plano altiĝata de kupolo kunligita rekte kun la ekzedroj de la kvar aloj kaj fermitaj per transeptaj turoj poligonalaj aŭ cilindra eksterne. La preĝejo gardis ses pentraĵojn de pentristo Jozefo Felice (Trapani, ___1661 – tie, 24 julio, 1734) prezentantaj la Pasionon, kaj Krucifikson el alabastro de skulptisto Alberto Tipa (Trapani, 10 julio 1732 – tie, ___1783). La preĝejo gardis la statuon al sankta Alberto, el ligno skulptita kaj kovrita je cm 170 x 50 per arĝenta lameno basita. Atribuita al Dominico Nolfo (Trapani, 14 decembro 1730 – tie, ___ 1782), ĝi estas dirita "de la Marinella" - Marbordeto por ĝin diferencigi el la plej konata statuo relikva el arĝento, artaĵo de Vincento Bonaiuto (___ - ___), kiu enhavas la kranion de Sanktulo kaj gardita en la sanktejo de la Anunciacio. Restaŭrita, de longe ĝi estas fermita al la kredo kaj hodiaŭ oni faras ekspoziciojn.

**13 -** Preĝejo kaj Monakejo Sankta Maria el Itrja (Sankta Rita), strato Garibaldi n.ro 79.








Ĝi staras sur antaŭa preĝejo en la rua Nova (nun strato Garibaldi), dediĉita al sankta Maria el Itrja, kiu estis cedita en 1621 al aŭgustenano Francisko de Sanìto (___ - ___) kun la sindevigo konstrui por la frataro sankta Maria el Itrja preĝkapeleton apude la preĝejo kaj ne ŝanĝi la nomon de la preĝejo mem. La kompletigaj kaj garnaĵaj laboroj de la konstruajo estis finitaj en 1697, jaro kiam ĝi estis sankciita de episkopo de Mazara de la Valo, mons. Bartolomeo Castelli – Kastelli (Palermo, ___ 1650 – Mazara de la Valo, Trapani, 5 aprilo 1730). La fasado laŭ du ordoj prezentas sur la pli malalta parto du konkojn, hodiaŭ sen statuoj, inter korintikaj kolonoj. En la dua ordo estas granda fenestro, responde la enira pordo. Je kronajo de la fasado estas lokita la blazono de Ermitanoj de sankta Aŭgusteno: koro trapikita per sago. La interno estas trinava kun dek du kolonoj el marmoro, kiuj ornamas flanke la preĝejon kaj ili disigas la ĉefaltaron el la ses flankaj. La fasado de la jaro 1745 estas de Petro Castro - Kastro (Trapani, ___1638 – tie, ___ 1694). En la ĉefaltaro estas lokita la skulpta grupo el ligno, tolo kaj gluo (XVIII jarcento) prezentanta la Sanktan Familion, artaĵo de Andreo Tipa (Trapani, 24 januaro 1725 – tie, 6 februaro 1766). En la preĝejo estas ankaŭ la Krucifikso (XVII jarcento) de Petro Orlando (___1651 - ___1699) kaj la tolo la ekstazo de Sankta Aŭgusteno

(XVII jarcento) de Petro Novelli (Monreale, Palermo, 2 marto 1603 – Palermo, 27 aŭgusto 1647), la pentraĵo al sankta Nikolao el Tolentino (XVII jarcento) de Andreo Carreca - Karreka (Trapani, ___ 1606 - Palermo, 13 februaro 1677) kaj la pentraĵoj al Ĉefanĝelo Rafaelo, al Madono el Itrja kaj al la Senmakula Virgulino (XVII jarcento) artaĵoj de Jozefo Felice - Feliĉe (Trapani, ___1661 – tie, 24 julio 1734).
En la internaj muroj, oraj kasonoj gardas veneritajn relikvojn de sanktuloj. La konvento, hodiaŭ, estas sidejo de la Scienca Liceo "Vincento Fardella".
Ĉiujare la statuo al santa Rita, kun la kapo ĉirkaŭita per rozkrono, estas portata procesie tra la stratoj de la urbo.

**14 -** Preĝejo kaj Konvento Sankta Maria de Jesuo, strato Sankta Elizabeta n.ro 1.









Dediĉita al la Epifania Mistero, ĝi estas en la malnova kvartalo Kasalikjo. Starigita en la unua duono de la XVI jarcento (ĉirkaŭ 1535), de la Observantaj Franciskanoj. La preĝejo sankta Maria de Jesuo, unu el la plej bela en Trapani, estis starigita sur la restaĵoj de antaŭa preĝejo dediĉita al sankta Marko post kiam la Observantaj Franciskanoj estis senigitaj de la preĝejeto sankta Maria de Grekoj lokita apud la muregoj, pro ilia pliigo volita de Karlo V (Gand, Belgio, 24 februaro 1500 – Cuacos de Yuste, Hispanio, 21 septembro 1558) kaj ili havis kompense la lokon okupita de la konsulejo de Venecianoj kaj de la kapelo sankta Marko, por starigi kredkonstruaĵon kaj konventon cedita al la Provinco en 1879 kaj detruita dum la dua mondmilito. La fasado kvadroŝtone havas belan portalon ogiva superstarita per konko konkforme. La interno estas je trinava disigitaj per pintarkaĵoj. Ĉe la enirejo en strato sankta Petro estas interesa reliefo dekkvinjarcenta kun sceno de la Anunciacio. Ene oni gardas Madonon kun Jesuo dirita Madono de la Anĝeloj (XV jarcento), el vitrigita terakoto, de Andreo de la Robbia (Florenco, 20 oktobro 1435 – tie, 4 aŭgusto 1525) - la tre blanka Madono estas hodiaŭ protektita per marmora baldakeno de la jaro 1521 de Antono Gagini - Gaĝini (Palermo, ___1478 – tie, ___aprilo 1536) -, pentraĵojn kun sankta Dominico kaj sankta Francisko de Vito Carrera - Karrera (Trapani, ___1555 ĉirkaŭ – Palermo, ___1622 ĉirkaŭ), sankta Diego kaj la Porciunkola de Dominico La Bruna (Trapani, 24 februaro 1699 – tie, 9 junio 1763). Multaj artaĵoj pasis al Muzeo. Estas rimarkinde la blazono de la familio Ĉiambra, grava familio nobela trapania kaj la sarkofago de Jakobo Staiti (___ - ___), alia grava personeco elstara de la trapaniana tiutempa nobeleco.

**15 -** Preĝejo Sankta Jakobo Majora, nun Biblioteko Fardelliana, placo Sankta Jakobo n.ro 1.







Antaŭe, dank'al Jozefo Berardo Ferro XXV (___5 julio 1753 - ___) oni malfermis al la publiko la Bibliotekon de Senŝuaj Aŭgustenanoj en la konvento sankta Maria el Itrja (strato Garibaldi); temis pri rimarkinda kolekto da libroj egala al tiu, kiu estis je dispono de Jezuitoj.
La konstruaĵo, starigita en la XIII jarcento de Kavaliroj de la Ordeno sankta Jakobo el Kampostela (Hispanio), kaj restrukturita en la XVI kaj XVIII jarcentoj, akceptis la partianojn al Krucmilitoj. Post la forigo de la Ordeno, la preĝejo estis konfidita al la Frataro de la Karitato de Sankta Kruco dirita de Blankoj, fondita en 1555 de nobeloj trapaniaj. La kunfratoj, vestitaj per blanka froko, kavis la taskon enterigi kadavrojn de malriĉuloj, konsoli mortkondamnitojn kaj pacigi la privatajn kontrastojn. En 1826 la nobela Frataro de Blankoj, asocio inter aristokrataj kie estis allasitaj ekskluzive tiuj, kiuj povis pruvi havi en la sango nur bluajn globulojn, metis je dispono de la Komunumo, farante regulan donacon, la supran parton de la preĝejo sankta Jakobo majora por tie loki bibliotekon. Aliaj riĉaj personoj kaj la antaŭaj kontribuis per mono al laboroj por la kompletigo de la Urba Biblioteko, poste pliigita per libroj de tiu Aŭgustena. La Frataro de Blankoj donacos poste ankaŭ la malsuperan parton de sankta Jakobo. Militministro, Johan Baptisto Fardella (Trapani, 29 julio 1762 – tie, 4 novembro 1836), estis la plej malavara kaj donacis ankaŭ la plej parton el la pentraĵoj de lia privata kolekto por havigi al la urbo pinakotekon. Tiu unua grupo da artaĵoj estis lokita en la samajn ejojn de la biblioteko kaj poste ĝi estos aranĝota en la Muzeo.
Malfermita al la publiko en aprilo 1830 kiel Publika Urba Biblioteko de la Ĉefvalo Trapani, ĝi estis titolita Fardelliana en marto 1831. La blazono de la Biblioteko Fardelliana prezentas noktuon, antikva simbolo de la Noktuo-Akademio, florita en Trapani en la XVII, XVIII kaj XIX jarcentoj. La kultura asocio "Noktuo-Akademio" celebris solene la fondon de la publika biblioteko dum kunsido en palaco Cavarretta.

La Fardelliana estas el la bibliotekoj pli konataj en Sicilio pro la riĉa fondaĵo je antikvaj manuskriptoj miniaturitaj, koraloj, arkivo de la urba Senato, korespondaĵoj de Antono Scontrino (Trapani, 17 majo 1850 – Florenco, 7 januaro 1922), Jozefo Polizzi (___ - Trapani, 5 septembro 1880), Alberto Buscaino Campo (Trapani, 26 januaro 1826 – tie, 6 februaro 1895), Vincento Fardella el Torre Arsa (Trapani, 16 julio 1808 – Palermo, 13 januaro 1889) kaj Nuncjo Nasi (Trapani, 2 aprilo 1850 – Monto Sankta Juliano, Erjĉe, Trapani, 17 settembre 1935) - kolekto de stampoj de arkitekto Johano Baptisto Piranesi (Moljano Veneto, Treviso, 4 oktobro 1720 – Romo, 9 novembro 1778). La biblioteko enhavas manuskriptojn reirantaj al la dekkvinajarcento, sed la libro pli antikva estas teksto de Sankta Aŭgusteno (inkunablo) presita en Kolonjo en la jaro 1467. La plej parto el la libroj tie garditaj estas plejparte je humanismaj enhavo, historia, jura, malplejparte scienca enhavo. La hemeroteko naskiĝas kiel speciala sezono dum la jaroj de la postmilito kaj ĝi gardas ĵurnalojn kaj gazetojn ankaŭ de la Deknaŭa jarcento.
En 1889 ĝi estis starigita kiel Senprofitan, dotata per statuto kaj administrata de Deputitaro prezidata de la dumtempa Urbestro. Por riĉigi la bibliotekon ĉiujare kelkaj libroj estas aĉetitaj, aliaj estas donacitaj de institucioj aŭ privatuloj.

**16 -** Preĝejo Sankta Petro, placo Sankta Petro.











Flanko Korso Italia

Trapani estis unu el la unuaj urboj en Sicilio aliĝi al kristanismo. La legendo rakontas, ke ĝuste ĉi tie sankta Petro haltis propagandi la novan kredon dum halto de lia vojaĝo al Romo kaj ke la popolo lasis la kulton por Neptuno, al kiu oferis la tinuson pli granda, kiun oni fiŝkaptis dum la jaro. La preĝejo, dediĉità al la Apostolo, estas sur la loko kie laŭ la tradicio li predikis kaj ĝi estis la unua paroko de Trapani, kiu plenumis konkrete dum jarcentoj la rolon kiel Ĉefpreĝejo. Ĝi estis rekonstruita en 1076 laŭ la volo de grago Roĝero II el Altavilla, la Normana (Mileto, Vibo Valentia, Kalabrio, 22 decembro 1095 – Palermo, 26 februaro 1154). En ĉi tiu preĝejo Petro III el Aragono (Valencio, Hispanio, ___1239 – Villafranka del Panedès, Hispanio, 11 novembro 1285) ĵuris, post la Siciliaj Vesperoj (30 marto 1282), pluteni la privilegiojn de la urbo. Ĉi tie Karlo

V (Gand, Belgio, 24 februaro 1500 – Cuacos de Yuste, Hispanio, 21 septembro 1558), en 1535, donacis al Trapani la brokatan standardon deprenita de la turka armeo dum la kampanjo en Tunizo. Pliigaj kaj restaŭradaj laboroj estis faritaj de 1695 ĝis 1753 fare de arkitekto Johano Blazo Amico - Amiko (Trapani, 3 februaro 1684 – tie, 3 septembro 1754). Pro gravaj fendoj, en 1775 estis faligitaj la antikvaj muregoj kaj rekonstruita la preĝejo, donante la taskon de la nova projekto al arkitekto Luciano Gambina (___ - ___), skolano de Johano Blazo Amiko. Partaj restaŭradoj, faritaj post la tertremo de la jaro 1968, perrmesis la remalfermon al la kredo de la preĝejo, laŭ dimensioj la plej granda en la urbo. Ĝia bazilika aranĝo je kvin navaj ĝin igas unika en la urbo. Admiras kelkajn la pentraĵon Jesuo Kristo, kiu alvokas Sankta Andreo al apostoleco de Andreo Carreca - Karreka (Trapani,___1606 - Palermo, 13 februaro 1677), Sankta Paŭlo de Marcelo Provenzano (___ - ___) kaj la skulptaĵoj el ligno: la Krucifikso de Jozefo Milanti (Trapani, duono de la XVII jarcento - ___ komenco de la XVIII jarcento), la Pietà de Francisko Nolfo (Trapani, ___1741 – tie, 25 septembro 1809) kaj Sankta Petro de Mario Ciotta - Ĉotta (Trapani, ___ 1639 - ___ 1724). Ene la orgeno, konstruita inter la jaroj 1836 kaj 1847 de Francisko La Grassa (Trapani, 20 novembro 1876 – Romo, 20 decembro 1952), estas konsiderata unika en la mondo pro la aparteco havi sep klavarojn kaj inĝenia mekanismo, kiu ilin kunigas (tri mekanikaj konzoloj unu centre kun tri klavaroj je sepdek klavoj kaj du flanke kun po du klavaroj, sume okdek registroj, kiuj funkciigas pli ol kvar milojn tubojn). Restaŭrita kaj redonita al ĝia origina brilo, ĝi povas esti ludita samtempe de tri orgenistoj. La orgeno estis inaŭgurita solene la 12an de februaro 2003 en la ĉeesto de Prezidento Karlo Azeljo Ciampi (Livorno, 9 decembro 1920 – Romo, 16 septembro 2016).


**17 -** Kapelo al Maristoj (Lumturo), strato Pordego Galli n.ro 53.



A.D. 1977
MARIA TRE SANKTA DE TRAPANI
DE MARLABORISTOJ

Kapelo dediĉita al “Maria Tre Sankta de Trapani de Marlaboristoj” (1977), apude la Regenteco Lumoj de Mararmeo, en la haveno. La kapelo estis rekonstruita en la alia parto de la strato sekve de la disfalo en placo Galli. La malgranda statuo sur la altaro estas reduktita kopio de la statuo lokita en la baziliko de la Anunciacio. Laŭ la tradicio en ĉi tiu loko haltis la ĉaro kun la bovoj, kiu transportis de la haveno la keston kun Madono.

**18 -** Preĝejo kaj Konvento Sankta Francisko el Asizo, strato Barlotta n.ro 2.






La restaŭritaj kampaniloj

Ĝi estis starigita en 1272 kune kun la konvento de beata Anĝelo el Rieti (___ - ___1258) de Franciskanoj, kunulo de sankta Francisko, alvenita al Trapani en 1224, sed la nuna preĝejo estis elpensita kaj konstruita per interesiĝo de patroj Jozefo Napoli, maljuna kaj juna, de la mesina arkitekto Bonaventuro Certo - Ĉerto (Mesino, ____1586 – Trapani, ___1650), kaj ĝi estis dediĉita al la Senmakula Koncipiĝo. La laboroj komenciĝis en 1630 ĉirkaŭ kaj finitaj la 4an de oktobro 1638. Ĝi estis konsekrita la 19an de aprilo 1646. Ĝi havas skemon je latina kruco je ununava kun kvar flankaj kapeloj kaj transepto. La fasado estas tre simpla: tri pilastroj formas du arkojn, kiuj kondukas en la atrion, kie inter du enirpordoj al la preĝejo, estas la grupo prezentanta la renkontiĝo de sankta Dominico kaj sankta Francisko eble de Kristoforo Milanti (Trapani, ___post 1655 - ___). Ene estas statuoj el stuko (XVII jarcento) de la trapania Kristoforo Milanti prezentantaj la Moralajn Virtojn (komencante de la centro de la interna fasado de la preĝejo kaj irante de maldekstre al dekstre oni havas tiujn “virtojn”: Forteco, Fervoro, Karitato, Saĝeco, Doktrino, Almozo, Elokvento, Konstanteco, Prudento) kaj la Papojn de la Franciskana Ordeno (de maldekstre al dekstre: Nilolao IV, Sisto IV, Gregorio IX, Aleksandro V, Sisto V, Julio II). En la orientaj muroj de la transepto estas maldekstre Mildo,

kaj dekstre Humileco. Ĝi gardas plie la pentraĵon al Madono de Trapani (XVIII jarcento) de Dominico La Bruna (Trapani, 24 februaro 1699 – tie, 9 junio 1763); la lignan Krucifikson (1661) de Leonardo Milanti (___ - ___), la statuon al sankta Antono el Padovo (XVII jarcento), de Petro Orlando (___1651 - ___1699) kaj la statuon de la Senmakula Virgulino (XVIII jarcento). Post la bombadoj de la dua mondmilito, estis restaŭritaj la kupolo de la preĝejo (1948) kaj la aliaj fendoj de la volbo (1952), Apude estas la konvento ornamata per marmoraj kolonoj kaj granda ŝtuparo, kun bela portalo (XVIII jarcento) de Johano Blazo Amico (Trapani, 3 februaro 1684 – tie, 3 septembro 1754). La pentraĵoj kaj la artaĵoj pli valoraj estas en la Muzeo. La 15an de majo 1900 la Trapani-Komunumo aĉetis de la Ŝtatbienaro la ejojn de la malnova konvento kaj ilin utiligis kiel lernejoj. La konvento nun estas sidejo de la Ŝtata Metia Lernejo por la Komerco.




Konvento, sidejo de la Ŝtata Metia Lernejo por la Komerco.

**19 -** Preĝejo Senmakula Koncipiĝo, strato Sankta Francisko el Asizo n.ro 72.






Dirita Senmakuleta, ĝi estis starigita ĉirkaŭ la jaro 1600 laŭ la iniciato de la Frataro Maria Tre Sankta de la Koncipiĝo. En 1732 arkitekto Johano Blazo Amico (Trapani, 3 februaro 1684 – tie, 3 septembro 1754) realigis la larĝigon de la absida zono. La interno estas ununava, kun diversaj stukaĵoj kaj kapiteloj faritaj de Nikolao Carreca (___ - ___). En la spaco limigita per pilastretoj estis lokitaj ok statuoj el stuko al la Eklezia Doktoroj de Alberto Orlando (___ 1653 - ___ unua duono de la XVIII jarcento). Verŝajne antaŭ ne longe la XIX jarcento estis konstruita tribuno supre la enira pordo kaj por la okazo estis rezignitaj du Doktoroj, tiel ke hodiaŭ restas nur ses el ili. Doktorj estus, dekstre: sankta Tomaso el Akvino, sankta Anastazio, sankta Aŭgusteno; maldekstre: sankta Bonaventuro, sankta Johano Krizostomo, sankta Gregoro la Granda. Al ĉi tiuj sekvis: sankta Hieronimo, sankta Ambrozio, ne plu ekzistantaj.

**20 -** Preĝejo Animoj de la Purgatorio, strato Sankta Francisko el Asizo n.ro 33.










Realigita de la kongregacio de la Sanktaj Animoj de la Purgatorio laŭ la projekto de arkitekto pastro Petro Lo Castro (Trapani, ___1638 – tie, ___1694), ĝi estis konstruita en 1688. La interno, je latina kruco, kun bazilika plano je tri navoj kun du vicoj de ses marmoraj kolonoj, kun kupola transepto, aperas hodiaŭ senornama pro la militaj eventoj, kiuj kaŭzis al la preĝejo gravajn domaĝojn. La fronto estis modifita en 1714, riĉiĝita per 12 statuoj el tofeca ŝtono stukita, prezentantaj la dekdu Apostolojn kaj Jesuon Kriston realigitaj de Alberto Orlando (___ 1653 - ___ unua duono de la XVIII jarcento), fare de la tiama plej grava arkitekto, la trapana Johano Blazo Amico (Trapani, 3 februaro 1684 – tie, 3 septembro 1754), kiu estas entombigita en la preĝejo. La fronto estas lia unua laboro. En 1754 ŝtontajlistamajstroj Vincento (___ - ___) kaj Johano Baptisto Incrivaglia (___ - ___) konstruis la marmorajn pilastrojn de la kapelo kaj la multkolorajn balustradojn de la flanka kapelo maldekstra. Domaĝita dum la dua mondmilito, ĝi estis remalfermita al fideluloj en 1962. De 1959 tie estas gardataj la famegaj "Misteri", du dek statuaj grupoj, vere majstraĵoj de lokaj skulptistoj, kiuj reelvokas la Pasion. Ĝi ne plu estas malfermita al la kredo.

### La Procesio de "Misteri".

En 1600, dum la hispana regado en Sicilio, ekas ankaŭ en Trapani la procesio de Misteri jam okazanta en Hispanio de la duono de la Dekkvina jarcento. Origine ĝi estis mastrumita de la "Religia Frataro de la Valorega Sango de Kristo kaj de Misteri" kaj poste konfidita per notaria akto al fakaj laboristoj kaj al iliaj konsuloj. La kunfratoj de sankta Mikaelo Arkanĝelo, kiuj postsekvis la kunfratojn de la Frataro de la Valorega Sango de Kristo, al kiuj oni devas la tradicion de "Misteri", malfermis, iam, tiun procesion. Forigita ankaŭ tiun Frataron, la tradicio estis ree farita pere de "volontuloj", kiuj surmetas por la okazo la ruĝan tunikon kaj la blankan kapuĉon, kiu iam apartenis al la Frataro.
La unuaj grupoj de Misteri naskiĝis inter la fino dela XVI jarcento kaj la komencoj de la XVII jarcento.
Ĉiu Sankta Vendredo, de pli ol kvarcento jaroj, en Trapani renoviĝas la tradicio de la Procesio de la Sakraj Grupoj de la Krucvojo, "Misteri". La Procesio, kiu serpentas laŭ la vojo je du kilometrojn, kuntrenas milojn da urbanoj kaj turistoj, kiuj venas el ĉiu parto de la mondo. La "Misteri" estas du dek skulptaj artaĵoj, realigitaj el tolo, ligno kaj gluo, prezentantaj la momentojn de la Pasiono kaj de la Forpaso de Jesuo. La statuoj, sur ligna bazo, estas dekoraciitaj per arĝentaĵoj kaj florkomponaĝoj kaj transportataj ŝultre laŭ la vojo de la urbo per la karakteriza "annakata", la movo, kiun la portantoj komunikas sekvante la muzikon de la bandoj. La rimarkindaj artaĵoj estis realigitaj inter la XVII kaj la XVIII jarcento en la metiejoj de la trapaniaj metiistoj specialiĝintaj pri la ligna, tola kaj glua tekniko kaj ili sin karakterizas per la profunda esprimeco de la vizaĝoj kaj per la precizeco de la gravuradoj. Ili estas garditaj la tutan jaron en la preĝejo Animo de la Purgatorio, de kie ili eliras, je la 14.00 de ĉiu Sankta Vendredo, por ilin enirigi, ĉe la fino de la Procesio, la matenon de la Sankta Sabaton.

**21 -** Preĝejo Sankta Francisko el Paola, placo Sankta Francisko el Paola.



Starigita da Paŭlanoj en la unua duono de la XVII jarcento, poste pliigita per la konstruo de la kupolego kaj la aldono de la refektorio. Ununava, ĝi havas baralvolbon kaj po tri kapelojn flanke. Tie estas gardata ligna statuo al sankta Francisko el Paola, artaĵo de Jakobo Tartaglia (Trapani, ___1678 – tie, 19 aprilo 1751). Tie estas gardata la tombo de Stefano Fardella el Mokarta (___ - Trapani, 31 aŭgusto 1791).

**Memorŝtono**: STEPHANO FARDELLA MOXHARTAE DYNASTAE - GENERIS NOBILITATE – PRAECLARO - IVSTITIA RELLIGIONE CARITATE – PRAECLARISSIMO - MINIMORUM FAMILIAE PARENTIS OPTIMI - CVLTORI EXIMIO - QVOD TEMPLVM HOC - AERE SVO RESTITVENDVM CVRAVERIT - HVIVS COENOBII SODALES P.B. M.P.P. - OBAN CIƆIƆ CCXCI PR. KAL. - SANNOS. NATVS. XCI (Al Stefano Fardella el la dinastio Mokarta, bontona je nobleco, tre eminenta pri justeco religio karitato, eminenta fakulo pri la gepatra familio, ĉi tiu preĝejo je propraj elspezoj li zorgis restaŭradi. La anoj de ĉi tiu cenobitejo lokis).

**22 -** Preĝejo kaj Konvento Sankta Dominico, placo Sankta Dominico n.ro 1.






Starigita de Dominikanoj, alvenita al Trapani revenintaj el la Krucmilitoj en la unuaj de la XIIIª jarcento kaj provizore akceptitaj en la hebrea kvartalo. En 1289 Jakobo II de Aragono, la Justa (Valencio, 10 aŭgusto 1267 – Barcelono, 2 novembro 1327) donis al ili la altaĵon plej alta en la urbo kie estis la preĝejeto Maria Virgulino. Per laŭgradaj pliigoj, en la unuaj de la XIV jarcento estis starigitaj la templo sankta Dominico kaj la aligita konvento, kie oni admiras du belegajn klostrojn. La nova preĝejo estis dediĉita al sankta Maria La Nova. Ununava kun dek flankaj kapeloj, en 1318 estis aldonita tomba kapelo por akcepti la restaĵojn de Manfredi (Katanja, ___1306 – Trapani, 9 novembro 1317), filo de Frederiko III el Aragono (Barcelono, 13 decembro 1272 – Paternò, Katanja, 25 junio 1337), forpasita ĉe la trapaniaj plaĝoj pro falo de ĉevalo (Ĝin atestas memorŝtono, kiu havas la daton de la jaro 1318). En la fasado estas la kadro de la dekkvarjarcenta rozono gotiko-kiaramontana. Deklarita reĝa kapelo dum la hispana regado, kelkaj memorŝtonoj memorigas, ke en ĉi tiu preĝejo en 1270 estris entombigitaj Teobaldo II el Navaro (___1239 – Trapani, 4 decembro 1270) kaj lia edzino Izabela el Francio (___, 2 marto 1242 – Hères, Francio, 27 aprilo 1271), filino de sankta Luizo IX (Poissy, Francio, 25 aprilo 1214 – Tunizo, 25 aŭgusto 1270, reĝo de Francio, forpasitaj en Trapani pro la pesto trafita en Tunizo dum la Krucmilito, Eleonora el Anglio (___ - ___), Gulielmo el Navaro (___ -___). En la Kapelo de la Krucifikso, realigita inter 1710 kaj 1732 laŭ la projekto de Johano Blazo Amico (Trapani, 3 februaro 1684 – tie, 3 septembro 1754), estas mirakla kaj antikva Krucifikso ligna de la XIII jarcento atribuita al Nikodemo, kiun Dominikanoj portis el Sirio en 1288, kie estas entenitaj valoraj relikvoj pri la Pasiono. Malantaŭ la absido estas la tiel dirita “Kapelo de Krucmilitistoj”, dekoraciita per interesaj freskoj de la XIV kaj XV jarcento. Ĉe la komenco de la XX jarcento ruiniĝis la barelvolbo de la navo de la preĝejo; la kovro estis tuj rekonstruita per tegmento je lignaj ĉevronoj. El la origina strukturo de la preĝejo, je ununava kun dek flankaj kapeloj, restas la absido kaj la kadro de la rozono. Reiras eble al la unuaj de la Dekvina jarcento la sonorilturo. La konvento havas du klostrojn, unu kvarportika kaj la alia portiko laŭ du flankoj.

**23 -** Preĝejo Maria Tre Sankta de Rozarieto, placo Sankta Dominico.




**24 -** Preĝejo Sankta Ĝeneroso, jam Sankta Margareta, strato Orfinoj n.ro 19.



Starigita en la Dekkvina jarcento kaj dediĉita al sankta Margareta. En la Dekoka jarcento ĝi estis konfidita al la fakaj koĉeroj kaj ĉaristoj kaj titolita al sankta Ĝeneroso. Rektangula ejo, ĝi sin karakterizas per la absida niĉo kaj la simpla kasonplafono.

**25 -** Preĝejo kaj Rifuĝejo por la Orfinoj aŭ Sankta Spirito, strato Gatti – angulo strato Orfinoj.



Starigita en la duono de la Dekoka jarcento. E 1747, laŭ la projekto de Johano Blazo Amico (Trapani, 3 februaro 1684 – tie, 3 septembro 1754), estis pliiĝita la Kolegio por Orfinoj, starigita de pastro Jakobo el Gubjo (___ - ___), fondinto de franciskanoj de la Tria Ordeno, per la beneficoj de barono Jakobo Ravidà (___ - ___), kaj starigita la preĝejo.
La flanka tabelo indikas: Bonfara Institucio “Domo de la Knabino kaj Princo de Napolo”, XVIª jarcento.

**26 -** Kapelo Triunuo, strato Orfinoj n.ro 5.



Iam aneksita al Monakinejo de la Abatejo Granda (detruita), ĝi estis starigita en 1542 de Franciskaninoj de la Tria Ordeno, proponita de pastro Jakobo el Gubjo (___ - ___), kiu estis la fondinto de la Ordeno, kune kun la apuda preĝejo de la Abatejo granda, refarita en la XVIII jarcento de Johano Blazo Amico - Amiko (Trapani, 3 februaro 1684 – tie, 3 septembro 1754). Ĉe la komenco de la XX jarcento la ejoj de la monakinejo estis akiritaj de la Komunumo. La preĝejo estas ununava je baroka stilo. Ĝi estis fermita al la kredo en 1955.

**27 -** Preĝejo kaj Monakejo Tre Sankta Triunuo aŭ Abatejo Granda, strato Abatejo Granda n.ro 23.











Flanko strato Orfani

Ĝi estis starigita, kune kun la monakejo, en 1542 de la Franciskaninoj de la Tria Ordeno. En 1698 la strukturoj estis pliigitaj. Ĉe la komenco de la XX jarcento la ejoj de la monakejo estis aĉetitaj de la Komunumo. La preĝejo, projektita de Johano Blazo Amico (Trapani, 3 februaro 1684 – tie, 3 septembro 1754), estas ununava je baroka stilo. Ĝi estis fermita al la kredo en 1955.

**28 -** Preĝejo Sankta Nikolao, strato Barono Sieri Pepoli n.ro 5 – angulo strato Karreka.






Lato via Carrera



Oni volas, ke ĝi estis konstruita sur antikva pagana templo dediĉita al Neptuno. Ĝi estas la dua baziliko en la urbo kaj, kune kun la preĝejo sankta Petro, la plej antikva. Ĝiaj originoj reiras al generalo Belizaro (___, Germanio, ___505 ĉirkaŭ – Konstantinopolo, ___565), kiu en 536 ĝin starigis, sub la titolo *De la Ĉieliro*, kiel preĝejo je greka rito. En la XIVª jarcento la familio de Manfredi Chiaramonte III (___ - Palermo, ___novembro 1391) ĝin modifis kaj ĝin dediĉis al sankta Nikolao. La nuna aranĝo, trinava kun transepto, estas tiu atribuita de Johano Blazo Amico (Trapani, 3 februaro 1684 – tie, 3 septembro 1754) en 1749. La plano estas latina kruco, dividita en tri navoj po pilastroj kun profundaj kapeloj ĉe la flankoj. La kovro estas barelvolbo lunetita. Sur la ĉefaltaro estas lokita triptiko el marmoro de 1560 presentanta Kriston resurentinta inter sankta Petro kaj sankta Nikolao atribuita al Antoneto Gagini (Palermo, ___1478 – tie, ___aprilo 1536), unu Krucumo kaj la busto de parokestro Antono Fardella (___ - ___) realigitaj de Andreo Tipa (Trapani, 24 januaro 1725 – tie, 6 februaro 1766), skulpta grupo el ligno, tolo kaj gluo prezentanta Kriston inter la du rabistoj, artaĵo de trapania metieco. Sur la suda fasado de la preĝejo, en konko estas la busto de sankta Nikolao (XVIII jarcento), artaĵo de Jakobo Tartaglia (Trapani, ___1678 – tie, 19 aprilo 1751).

**29 -** Kapelo Tre Sankta Anunciacio, strato de la Artoj n.ro 22.




La Kapelo estis starigita memore al historia okazaĵo. Estante Sicilio regata de la hispana Vicreĝo Roderiko Mendoza y Roksas y Sandoval (___ - ___), francoj difektis niajn marojn kaj en 1654 ili sieĝis la urbon Mesinon. Dum tiu sieĝo aperis al la servantino de Dio Katarina Tagliavia Burgio edzinigita De Vincenzi (___ - ___), Madono de Trapani (konata tiam sub la titolo Maria Tre Sankta Anunciacio), kiu promisis liberos la Regno de la francaj rabekspedicioj, kondiĉe ke oni memoros la okazaĵon la tagon kiam la urbo Mesino estus liberigita de la sieĝo.
La urbo sieĝita estis liberigita la 16an de marto 1654 kaj sinjorino Katarina, rajtigita de Vikario Kamilo Pignatelli (___ - ___), konstruigis la kapelon en la apudecoj de ŝia palaco. Ĉiujare, la 16an de marto, estas celebrata en la kapelo Sanktan Meson, memore al la okazaĵo profete anoncita.
La pentraĵo lokita sur la altaro kaj prezentanta Anunciacion, estas atribuita al pentristo Jakobo Lo Verde (___ - ___).

**30 -** Preĝejo de la Tre Sankta Sakramento, strato gen. Dominico Giglio n.ro 12.









**31 -** Preĝejo kaj Konvento Sankta Roko, strato Antoneto Turretta n.ro 12.





La konvento estis starigita en 1574 de pastro Bugio (___ - ___) el la senŝuaj Franciskanoj de la Tria Ordeno. La preĝejo estis konstruita sur la areo de la Dogano-magazenoj kaj restarigita en 1770 fare de arkitekto don Paŭlo Rizzo - Rico (___ - ___). Post la forigo de la religiaj ordenoj en 1866 ĝi iĝis sidejo de la Poŝtoficejo, poste de la Instituto pri Higieno kaj Profilakso kaj ankoraŭ lerneja sidejo kaj, ĝis antaŭ ne longe, komunumaj oficejoj.

**32 -** Preĝejo kaj Konvento Sankta Aŭgusteno, placo Saturno.






Ĝia konstruo reiras al la unua duono de la Dekkvara jarcento. Starigita kun la aligita hospico de Templaj Kavaliroj fuĝintaj el Palestino kaj de ili dediĉita en 1101 al sankta Johano Baptisto, ĝi estis poste konfidita de Frederiko II el Aragono (Barcelono, 13 decembro 1272 – Paternò, Katanja, 25 junio 1337) al Aŭgustenanoj, kiuj, en 1313, pliigis la originan planon, konstruante la apudan konventon. Iĝita Ĉefpreĝejo de la urbo, imperiestro Karlo V (Gand, Belgio, 24 februaro 1500 – Cuacos de Yuste, Hispanio, 21 septembro 1558) en 1535 ĵuris ĉi tie solene teni la privilegiojn donitaj al Trapani. El la antikva templo, detruita de incendioj kaj de militoj, restis la aŭstera portalo kaj la rozono je krucitaj arketoj sur kiuj oni rimarkas la simbolojn de la tri monoteistaj religioj: la rozonetoj traboritaj kaj arabaj tipe islama, la du hebreaj Davido-steloj kaj la centra Ŝafido de Dio, kristanisma simbolo. La rozono revokas plie la edenon, alia krista simbolo, preskaŭ celi ĝardeno je paca kunvivado inter la diversaj religioj. En la norda fasado de la preĝejo estas la bildo de templano inter du kolonoj ornamitaj per vitbranĉoj. La preĝejo, sakra ejo kie la trapania Senato praktikis ĝian kredon, estis ornamita per dek unu altaroj, po kvin flanke plus la ĉefa: ĉi lasta estis renovigita en la XVIII jarcento de Frederiko Siracusa (Trapani, ___1759 - ___1837) kaj tie estis pentraĵo prezentanta sanktan Blazon. Forlasita en la XIX jarcento sekve de la renversaj Leĝoj, profunde trafita de bombadoj de la jaro 1943, la preĝejo, rekonstruita en la absida parto, akceptos la stariganta Diocezan Muzeon. El la antikvaj meblaroj, kiuj ornamis la internon estas garditaj en la Regiona Muzeo “A. Pepoli” kelkaj tabuloj de la ligna plafono kaj la ebura relikvujo kun scenoj el la Malnova kaj el la Nova Testamento, majstraĵo de la ebura arto de la Metiejoo Tipa. Ene estas videblaj la spurojn de la radikala transformo okazita ĉe la komencoj de la XIX jarcento fare de arkitekto Jozefo Venanzjo Marvuglia (Palermo, 6 februaro 1729 – tie, 19 decembro 1814) kaj de la restaŭradoj faritaj post la lasta mondmilito. La freŝa restaŭrado de la fasado lumigis la dekoraciojn de la rozono, karakterizata per ornamitaj simbolaro atestanta la konfluon pri religiaj lingvoj, kiu vidis en Trapani la kunvivadon de la tri grandaj monoteistaj religioj: hebrea, krista kaj islama. Supre la portalo, en konko, estas Madoneto kun Jesuo atribuita al **Antonello** Gaĝini (Palermo, ___1478 – tie, ___aprilo 1536). Hodiaŭ ĝi estas destinita al Aŭditorio.

**33 -** Paroko Maria Tre Sankta Helpo, strato J. B. Fardella n.ro 22.






La konstruado de la preĝejo okazis en 1923 fare de Salesanoj lau la iniziato de kanoniko Jozefo Zichichi-Zikiki (Trapani, 2 aŭgusto 1858 – tie, 15 marto 1927).

**34 -** Paroko Sakra Koro de Jesuo, strato J. B. Fardella n.ro 223.









Pli ol antaŭ jarcento ekzistis preĝejeto dediĉita al la Sankta Koro de Jesuo, flanke de la hodiaŭa eniro de la eks konvento de Servistoj de Maria en strato de la Milo.
La preĝejo estis konstruita en 1927 laŭ la volo de kanoniko Jozefo Zichichi-Zikiki (Trapani, 2 aŭgusto 1858 – tie, 15 marto 1927), devota al la Sakra Koro de Jesuo, laŭ la projekto de Francisko La Grassa (Trapani, 20 novembro 1876 – Romo, 20 decembro 1952).
La lokado de la unua ŝtono okazis la 23an de septembro 1923. La preĝejo Sakra Koro de Jesuo iĝis paroko en 1932. La 8an de decembro 1933 estis nomumita unua parokestro kanoniko Matteo Santoro (Valderjĉe, Trapani, 3 julio 1893 – tie, 30 marto 1945), kiu interesiĝis pri la pliigo kaj la plibonigo de la preĝejo. Per la monoferoj de fideluloj estis antaŭe farita la pavimo kaj la parokestro, je propraj ekspezoj, konstruigis la balustradon de la ĉefaltaro. La 25an de novembro 1945 la paroka preĝejo estis konfidata al Servoj de Maria kaj estis faritaj kelkaj modifoj ene la preĝejo: la marmora altaro, la balustrado kaj la statuo de la Pietà, ĉio oferita de devota familio. Ĉar la preĝejo estis facile trafebla de inundoj (fakte ĝi estis sub la strata nivelo), oni ekpensis starigi la novan preĝejon, kiu povus eviti tiun riskon. Tiu decido estis alprenita post la inundo de septembro 1963. Pro tio Episkopo mons. Francisko Ricceri (Biankavilla, Katanja, 20 aprilo 1903 – tie, 28 julio, 1980) donis la startsignon al la adjudika konkurso por la projektoj. La lokado de la unua ŝtono de la nova preĝejo okazis en oktobro 1974 per celebrado estrita de Lia Mosto mons. Ricceri. La konstruado daŭras ĝis 1980, jaro kiam por la Antaŭtago de la Sankta Kristnasko oni celebras la unuan Meson en la nova preĝejo, malgraŭ ĝi estas ankoraŭ preskaŭ konstruejo. La preĝejo estis konsekrita en junio 1981 okaze de la Festo de la Sankta Koro.
Statuoj: Madono de Trapani reiranta al 1837 kaj donacita de baronoj Ripa; sankta Francisko el Asizo, donacita de sinjorino Ada Bruni (___ - ___); Senmakula Koncipiĝo kaj sankta Anna, devenintaj el la antikva preĝejeto.

**35 -** Preĝejo Sankta Alberto, strato Mikaelo Amari n.ro 12.






La preĝejo estis konstruita en 1962 laŭ la desegno de Andreo Lipari (___ - ___), malfermita al la kredo la 7an de aŭgusto 1963 kaj iĝita paroko la 7an de aŭgusto 1968. Ĝi estis starigita laŭ la volo de episkopo de Trapani mons. Francisko Ricceri (Biankavilla, Katanja, 20 aprilo 1903 – tie, 28 julio, 1980). La statuo al sankta Alberto, el ligno skulpita kaj pentrita, de Dominico Nolfo (Trapani, 14 decembro 1730 – tie, ___1782) kun arĝenta lamenoj basitaj kaj ĉizitaj de la trapaniaj arĝentaĵistoj Jozefo (___ - ___) kaj Johano Caltagirone (___ - ___), estas dirita “de la Marbordeto” por ĝin diferencigi de la pli konata relikva statuo gardita en la sanktejo de la Anunciacio.
Tiu nomo devenas ankaŭ de la fako ke origine ĝi estis gardata en la preĝejo sankta Maria de la Graco, lokita en la samnoma strateto apude la strato Biskvitistoj konstruigita en la Deksepa jarcento de unu el la trapaniaj maristaroj kaj ĝuste el la tiel dirita Marbordo Malgranda aŭ Marbordeto al kiu estis kunigitaj la klaso de fiŝistoj kaj la proprietuloj de fiŝboatoj, kiuj fiŝis koralon. Detruita la preĝejo dum la dua mondmilito, la statuo estis transportita en la preĝejon sankta Alberto en strato Garibaldi. Ĉe la fino de la Dudeka jarcento estis refarita la aŭreolo de la Sanktulo de la trapania arĝentisto Pladimiro Fiorenza (___ - ___) certe kiam ĝi estis transportita al Kvartalo Palma (nun Kvartalo Sankta Alberto) en 1965.
Artaĵoj: Sankta Vespermanĝo (1776) de Antono Pennisi (___ - ___), Krucifikso de nekonata artisto (XVI jarcento), Madono de Trapani, sankta Alberto kaj sankta Orsola de nekonata sicilia pentristo (XVII jarcento).

**36 -** Sanktejo Maria Tre Sankta de Trapani, strato grafo Aŭgusteno Pepoli n.ro 194.









Enirejo de la vilao

Komence ĝi estis kapeleto, starigita en la duono de la jaro 1200. La Sanktejo estis starigita en kampara zono apenaŭ malproksima de la urbo, propraĵo de familkio Del Bosco.
La Sanktejo de la Anunciacio, plibone de "Madono de Trapani", estas en la Kvartalo, kiu de ĝi alprenas la nomon. Starigita ĉe la unua duono de la XIV jarcento (inter 1315 kaj 1332) de Karmelanoj, post ilia alveno en Trapani okazita inter 1224 kaj 1240, sekve de donaco ricevita la 24an de aŭgusto 1250 de notario Ribaldo de Abati-anoj (___ - ___) kaj lia edzino Palma (___ - ___): terpacelo kun domaro kaj preĝejeto dediĉita al sankta Maria Anunciacio (hodiaŭ konsistigita el la Sanktejo kaj de la eks Konvento, nun sidejo de Muzeo "Pepoli"). Karmelanoj pliigis la preĝejeton, kompletante la laborojn en 1332. La preĝejo havis bazilikan planon je trinava, disigitaj per pilastroj. La ĉefa pordo, araba-normana stilo, ogivforme, reiras al 1361; rozono

laŭ radioj kaj du statuetoj, la anĝelo kaj Madono, superstaras la du flankajn pordojn. En 1741 ĝi suferis refaron preskaŭ totala je baroka stilo, laŭ la projekto de la trapania arkitekto Johano Blazo Amico (Trapani, 3 februaro 1684 – tie, 3 septembro 1754), kiu lasis al ni en lia traktato *La praktika Arkitekto* la planon de la origina preĝejo. La interno estas je ununava kun diversaj kapeletoj. La kapelo el diverskoloraj marmoroj faras kiel juvelujo por la tre bela marmora statuo al Madono de Trapani (ĉirkaŭ 1380) de Nino Pisano (Pizo, ___1315 – tie, ___1368), patronino de la urbo kaj protektantino de navigistoj, kiu tenas sur la brako la ŝlosilojn de la urbo kaj havas en la dekstra mano oran rozon al ŝi donacita de Karlo V (Gand, Belgio, 24 februaro 1500 – Cuacos de Yuste, Hispanio, 21 septembro 1558) en 1535. Ĉe la piedoj de Madono estas la arĝenta maketo de la urbo, ĉirkaŭ kiu oni legas la latinajn vortojn: MISERERE CIVITATE REQUIEI TUÆ - Havu mizerikordo de la urbo kie vi ripozas.
Oni tien eniras tra rnesanca arko fermita per kadro el bronzo de 1591. La Kapelo al Madono de Trapaninestis komencita en 1498 kaj finita en 1520.
Memorŝtono gardita en la Preĝejo Kolegio de Jezuitoj oni legas: SIMVLACRVM B.M.V. DREPANITANAE E SIRIA TRANSVECTVM HUC PRIMO APPVLIT ANNO MCLXXXVIII VIII AVGVSTI - La statuo de la Beata Maria Virgulino trapania transportita de Sirio atingis komence en ĉi tiun lokon la 8an de aŭgusto 1188.
La opinio pli komuna akceptita estas ke la statuo al Madono estis transportita en Trapani-n en 1291 de Guerregio (Pizo ___ - ___), jerusalema kavaliro naskiĝinta en Pizo, kiu ĝin skulptigis en lia urbo. Ĝin kunportita en lian orientan komandon, volinte ĝin salvi, post multe da jaroj, de la persekutoj de Saracenoj, li enŝipiĝis kune la altvalora statuo kaj, trafita de tempesto, li votis ĝin lasi en la unua tero, kiun li tuŝis.
En la ombro de Madono estas la statuo kovrita per arĝenta lameno, kun la relikvoj, al sankta Alberto de Abatanoj (dua patrono de la urbo kune kun Madono), karmelano, kiu en la konvento de la Anunciacio vivis la unuajn jarojn de lia vivo beata kaj sankta.
Dekstre de la Preĝejo Granda estas la Kapelo de Fiŝistoj, komisiita en 1481 de kelkaj trapaniaj fiŝistoj.
La kampanilo en la nuna formo oni devas al Nikolao Pisano (___ - ___). Sur la sonoriloj, refanditaj en 1947 kaj sankciitaj la 16an de novembro 1947 de kardinalo Ernesto Ruffini (Sankta Benedikto Po, Mantuo, 19 januaro 1888 – Palermo, 11 junio 1967), estas reproduktitaj la bildoj de Madono de Trapani kaj de sankta Alberto; la skriboj estas de pastro Alberto Grammatiko (Erjĉe, Trapani, ___ - ___, 13 majo 1960), karmelano.
La Sanktejo iĝis paroko per Buleo de la 15a de decembro 1909 de la karmela episkopo mons. Francisko Raiti (Linguaglossa, Katanja, 7 februaro 1864 – Trapani, 1 majo 1932), kaj, la 25an de marto 1950, minora baziliko de papo Pio XII (Romo, 2 marto 1876 – Kastel Gandolfo, Romo, 9 oktobro 1958).
El la artaĵoj ekzistantaj en la sanktejo, estas la freskoj de la volbo de la sakristio de Dominico La Bruna (Trapani, 24 februaro 1699 – tie, 9 junio 1763), pentraĵojde Jozefo Felice - Feliĉe (Trapani, ___1661 – tie, 24 julio 1734), la statuo el ligno al Sankta Elija kaj la statuo al sankta Jozefo kun Jesuo de Francisko Nolfo (Trapani, ___1741 – tie, 25 septembro 1809), Krucifikso de Petro Orlando (___ 1651 - ___ 1699), diversaj artaĵoj de la trapania metieco (la antaŭaltara panelo el arĝento de la altaro, la tabernakolo).





La 16an de aŭgusto oni celebras la Feston de Madono de Trapani. La statuo al Madono estas transportata procesie de la Katedralo sankta Laŭrenco tra la stratoj de la urbo.
Dum la transporto de la statuo, la popolo kutime krias ameme: *Vivu Maria kaj sankta Alberto*.





La 7an de aŭgusto oni celebras la Feston de sankta Alberto, dua patrono de la urbo. La statuo de Sanktulo estas transportata procesie de la Baziliko de la Anunciacio ĝis la Katedralo, kie ĝi restas ĝis la 9a de aŭgusto.
Dum la transporto de la statuo, la popolo kutime krias ameme: *E chi 'un semu tutti trapanisi? Ittamuc'illa tutti na santa vuci! Viva Maria e Santu Libbettu…!. - Ĉu ni ne estas trapanianoj? Kriu ni ĉiuj sanktan voĉon! Vivu Maria kaj sankta Alberto…*!

**37 -** Paroko Nia Sinjorino de Lurdo, strato Virgiljo n.ro 151.







La preĝejo estis konstruita en 1958.

**38 -** Paroko Sankta Tereza de Jesuo-infano, strato Serraino Vulpitta.




La preĝejo estis konstruita laŭ la desegno de inĝeniero Luizo Lo Verso (___ - ___) per iniciato de Episkopo mons. Korrado Mingo (Rosolini, Sirakuzo, 8 septembro 1901 – Mazara de la Valo, Trapani, 16 majo 1980). La laboroj komenciĝis en 1955 kaj finis la 24an de septembro 1960. Ĝi iĝis paroko per Buleo de la 29a de junio 1955.

**39 -** Preĝejo Sankta Johano, strato Paĉe n.ro 34.












La preĝejo estis konstruita en 1964.

LISTO DE LA PREĜEJOJ


| | |
|---|---|
| - Animoj de la Purgatorio (Preĝejo de la) | 20 |
| - Kapucenoj, dirita Epifanio (Preĝejo kaj Konvento) | 3 |
| - Karmeleto (Preĝejo de -  Sankta Jozefo) | 11 |
| - Karmelo (Preĝejo de) | 9 |
| - Maria ĉiam Dolora Virgino (Preĝejo) | 5 |
| - Maria Tre Sankta Helpo (Paroko) | 33 |
| - Maria Tre Sankta de Rozarieto (Preĝejo) | 23 |
| - Maria Tre Sankta de Trapani (Sanktejo) | 36 |
| - Maria Tre Sankta Senmakula, dirita de Jezuitoj (Kolegio kaj Konvento) | 7 |
| - Maristoj (Kapelo al  - Lumturo) | 17 |
| - Nia Sinjorino de Lurdo (Paroko) | 37 |
| - Orfinoj aŭ Sankta Spirito (Preĝejo kaj Rifuĝejo por la) | 25 |
| - Sakra Koro de Jesuo (Paroko) | 34 |
| - Sankta Alberto (Preĝejo, stato Amari M.) | 35 |
| - Sankta Alberto (Preĝejo, strato Garibaldi G.) | 12 |
| - Sankta Aŭgusteno (Preĝejo kaj Konvento) | 32 |
| - Sankta Dominico (Preĝejo kaj Konvento) | 22 |
| - Sankta Francisko el Asizo (Preĝejo kaj Konvento) | 18 |
| - Sankta Francisko el Paola (Preĝejo) | 21 |
| - Sankta Ĝeneroso, jam Sankta Margareta (Preĝejo) | 24 |
| - Sankta Jakobo Majora, nun Biblioteko Fardelliana (Preĝejo) | 15 |
| - Sankta Johano (Preĝejo kaj Konvento, strato Libereco) | 8 |
| - Sankta Johano Baptisto (Preĝejo, strato Pace) | 39 |
| - Sankta Laŭrenco Martiro (Preĝejo - Katedralo) | 6 |
| - Sankta Liberale (Preĝejo) | 4 |
| - Sankta Lucia aŭ Maria Tre Sankta de la Ĉeno (Preĝejo) | 2 |
| - Sankta Maria de Jesuo (Preĝejo kaj Konvento) | 14 |
| - Sankta Maria de la Helpo, dirita Abatejo Nova (Preĝejo kaj Monakejo) | 10 |
| - Sankta Maria el Itrja (Preĝejo kaj Konvento – Sankta Rita) | 13 |
| - Sankta Maria Tre Sankta de Kustonaĉi (Preĝejo) | 1 |
| - Sankta Nikolao (Preĝejo) | 28 |
| - Sankta Petro (Preĝejo) | 16 |
| - Sankta Roko (Preĝejo kaj Konvento) | 31 |
| - Sankta Tereza de Jesuo-Infano (Paroko) | 38 |
| - Senmakula Koncipiĝo (Preĝejo de la) | 19 |
| - Tre Sankta Anunciacio (Kapelo de la) | 29 |
| - Tre Sankta Sakramento (Preĝejo de la) | 30 |
| - Tre Sankta Triunuo aŭ Abatejo granda (Preĝejo kaj Monakejo) | 27 |
| - Triunuo (Kapelo de la) | 26 |

**BIBLIOGRAFIO**

(Laŭ la itala ordo, unika por ĉiuj la tri laboroj: Monumentoj, Palacoj kaj Preĝejoj de Trapani)


- ASSOCIAZIONE AMICI del Museo Pepoli, *Il Museo interdisciplinare Regionale Agostino Pepoli*, Trapani, settembre 2013;

- CASTORO Eliseo e LA VIA COLLI Valentina, *S. Alberto degli Abbati, Carmelitano – Patrono di Trapani*, Lito-tipografia “Nuova stampa” – Trapani, dicembre 2006;

- CENTRO STUDI “Giulio Pastore”, Trapani, *Cinquant’anni di vita amministrativa a Trapani, 1943 – 1993*, a cura di Michele Megale;

- CHIESA “San Lorenzo Martire” Cattedrale della Diocesi di Trapani, *Guida pratica alla visita della Cattedrale*;

- CITTA’ DI TRAPANI – Ufficio Stampa, *Guida alla città*, 2005;

- COSTANZA Salvatore, *Il teatro a Trapani*, Tipografia “Cartograf”, Trapani, 1979;

- CROCIATA Michele A., *Primati storici ed efficaci contributi che la Sicilia e i suoi abitanti hanno dato, nel corso dei secoli, al progresso dell’umanità e allo sviluppo della civiltà*, 2008;

- DI BERNANDO VULPITTA Anna, *Trapani nostra. Via G.B. Fardella, Sindaco,* 1° quaderno della serie “Dedicato ai giovani: I Personaggi, Trapani, 2006;

- DI BERNANDO VULPITTA Anna, *Trapani nostra. Via Antonio Scontrino*, 2° quaderno della serie “Dedicato ai giovani: I Personaggi, Trapani, 2006;

- GIACALONE Francesco, *Storia di Trapani*, Edizioni Colorgrafica, 2ª ristampa, Casa Santa, Erice (TP), dicembre 2008;

- LE CENTO CITTA’ d’Italia illustrate: *Trapani, la città dei due mari*, Edizioni Librarie Siciliane, Palermo, 1982;

- LO STRADARIO di Trapani e Casa Santa Erice, 2009;

- ROTOLO padre Filippo O.F.M. conv., *La chiesa di San Francesco d’Assisi in Trapani*, Tipolito Bellanca S.p.A., Palermo, settembre 1975;

- SERRAINO Mario, *La chiesa di S. Maria dell’Itria e i PP. Agostiniani Scalzi di Trapani*, Arti grafiche Corrao, Trapani, dicembre 1982;

- SERRAINO Mario, Storia di Trapani, 2ª edizione, Vol. II, Corrao Editore, Trapani, 1992;

- TRAPANI NOSTRA n. 6, giugno 1961.

NOMLISTO
(Laŭ la itala)


ABATE, Ribaldo degli, 36
ABATI, Sant'Alberto degli, 3, 12, 35, 36
ACCADEMIA della Civetta, 15
AGOSTINIANI (Padri), 32
ALESSANDRO V (Papa), 18
ALFONSO V d'Aragona, il Magnanimo, 6
AMICO, Giovanni Biagio, 6, 7, 10, 16, 18, 19, 20, 22, 25, 26, 27, 28, 36
AMOROSO, Mons. Domenico, 6
ANGELO da Rieti, Beato, 18

BELISARIO, 10, 28
BIBLIOTECA Comunale del Capovalle (vidu BIBLIOTECA "Fardelliana")
BIBLIOTECA degli Agostiniani Scalzi, 15
BIBLIOTECA "Fardelliana", 2, 15
BLANDINO, Tommaso, 7
BONAMICI, Francesco, 7
BONAIUTO, Vincenzo, 12
BORREMANS, Guglielmo, 7, 10
BORROMANZI, Guglielmo, il Tedesco (vidu BORREMANS)
BRUNI, Ada, 34
BUGIO, padre -. 31
BUSCAINO CAMPO, Alberto, 15

CALTAGIRONE, Giovanni, 35
CALTAGIRONE, Giuseppe, 35
CAPPELLA della SS. Annunziata, 29
CAPPELLA di Maria SS. di Trapani dei Marittimi, 17
CAPPELLA di San Giorgio, 6
CAPPELLA di San Marco, 14
CAPPUCCINI (Padri), 3
CARLO V d'Asburgo-d'Austria, 14, 16, 32, 36
CARMELITANI (Padri), 9, 36
CARRECA, Andrea (vidu CARRERA)
CARRECA, Nicolò, 19
CARRERA, Andrea, 6, 10, 13, 16
CARRERA, Vito, 9, 14
CASA della Fanciulla e Principe di Napoli, 25
CASTELLI, Mons. Bartolomeo, 13
CASTRO, Pietro (vidu LO CASTRO)
CATALANI, Giovanni (detto Angelo S.), 10
CATALANI, Pietro Martino, 10
CAVALIERI dell'Ordine Equestre di San Giacomo di Campostela, 15
CAVALIERI Gerosolimitani, 8
CAVALIERI Templari, 32
CAVARRETTA (Palazzo), 15
CERTO, Bonaventura, 6, 8, 18
CHIARAMONTE, Manfredi III, 28
CHIESA del Collegio dei Gesuiti, 36
CHIESA del Sacro Cuore di Gesù, 34
CHIESA dell'Ascensione, 28
CHIESA dell'Immacolatella, 19
CHIESA di Maria Vergine, 22
CHIESA di San Francesco d'Assisi, 3
CHIESA di San Giacomo, il Maggiore, 15
CHIESA di San Giovanni Battista, 32
CHIESA di San Lorenzo (Cattedrale), 6, 36
CHIESA di San Marco, 14
CHIESA di San Nicola, 28
CHIESA di San Pietro, 28
CHIESA di Sant'Alberto (via Garibaldi), 35
CHIESA di Sant'Anna, 3
CHIESA di Santa Margherita, 24
CHIESA di Santa Maria dei Greci, 14
CHIESA di Santa Maria della Grazia, 35
CHIESA di Santa Maria di Gesù, 14
CHIESA di Santa Maria La Nova, 22
CHIESA di Santa Sofia, 10
CHIESETTA di Santa Maria Nunziata, 36
CIAMBRA (Famiglia), 14
CIAMPI, Carlo Azeglio, 16
CIOTTA, Mario, 16
COLLEGIO dei Gesuiti, 7, 36
COLLEGIO delle Orfane, 25
COMPAGNIA dei Bianchi, 15
COMPAGNIA dei Corallari, 2
COMPAGNIA della Carità di Santa Croce (vidu COMPAGNIA dei Bianchi)
COMPAGNIA di Gesù, 7
COMPAGNIA di Santa Maria del Carmelo, 11
CONFRATERNITA del Preziosissimo Sangue di Cristo, 20
CONFRATERNITA di San Michele Arcangelo, 20
CONFRATERNITA di Santa Maria dell'Itria, 13
CONFRATERNITA di Santa Maria SS. della Concezione, 19
CONGREGAZIONE dei Sacerdoti (di Sant'Alberto), 12
CONGREGAZIONE delle Anime Sante del Purgatorio, 20
CONGREGAZIONE "Povere Figlie di Maria SS. Incoronata", 5
CONSOLATO dei Veneziani, 14
CONVENTO dei Servi di Maria, 34
CONVENTO di Santa Maria dell'Itria, 15

DE SANÌTO, padre Francesco (Priore), 13
DEL BOSCO (Famiglia), 36
DELLA ROBBIA, Andrea, 14
DI FERRO, Giuseppe Maria Berardo, 15
DIOLIVOLSI, Giacomo, 9
DOMENICANE di Santa Caterina, 10
DOMENICANI (Padri), 22
DYCK, Antoon van (vidu Van DYCK)

ELEONORA d'Inghilterra, 22
EREMITI di Sant'Agostino, 13
ERRANTE, Giuseppe, 11

FARDELLA, Antonio (Parroco), 28
FARDELLA di Mokarta, Stefano, 21

FARDELLA di Torre Arsa, Giovan Battista (Ministro), 15
FARDELLA di Torre Arsa, Vincenzo, 15
FARDELLA-DI BLASI, Teresa, 5
FEDERICO II d'Aragona, 32
FEDERICO III d'Aragona, il Semplice, 22
FELICE, Giuseppe (vidu FELICI)
FELICI, Giuseppe, 3, 6, 9, 12, 13, 36
FILIPPELLA, Simone, 1
FILIPPINI (Padri), 8
FIORENZA, Pladimiro, 35
FOGLIANI SFORZA d'Aragona, Marchese Giovanni, 7
FRANCESCANI del Terzo Ordine, 25
FRANCESCANI Minori Osservanti (Padri), 14
FRANCESCANI Scalzi del Terzo Ordine, 31

GAGINI, Antonello, 14, 28, 32
GAMBINA, Luciano, 16
GESUITI (Padri), 7, 15
GIACOMO da Gubbio, padre, 25, 26
GIACOMO II d'Aragona, il Giusto, 22
GIOVANNI PAOLO II (Papa), 6
GIULIO II (Papa), 18
GIUSTINIANO I, 10
GRAMMATICO, padre Alberto, 36
GREGORIO IX (Papa), 18
GREGORIO XVI (Papa), 6
GUERREGIO, 36
GUGLIELMO di Navarra, 22

IMMACOLATA Concezione, 7, 13, 18, 34
INCRIVAGLIA, Giovan Battista. 20
INCRIVAGLIA, Vincenzo, 20
INTENDENZA di Finanza, 10
ISABELLA di Francia, 22
ISTITUTI di igiene e Profilassi, 31

LA BRUNA, Domenico, 6, 9, 14, 18, 36
LA GRASSA, Francesco, 16, 34
LIPARI, Andrea, 35
LO CASTRO, Pietro, 5, 13, 20
LO VERDE, Giacomo, 29
LO VERSO, Luigi, 38
LUIGI IX, il Santo, 22

MADONNA degli Angeli, 14
MADONNA del Carmine, 9
MADONNA del Rosario, 10
MADONNA del Soccorso, 10
MADONNA dell'Itria, 13
MADONNA di Custonaci, 1
MADONNA di Trapani, 3, 9, 17, 18, 29, 34, 35, 36
MANFREDI di Sicilia (di Trinacria), 22
MANFRINI, Enrico, 6
MANNO, Vincenzo, 6
MARABITI, Ignazio, 7
MARIA SS Annunziata (vidu MADONNA di Trapani)
MARVUGLIA, Giuseppe Venanzio, 32
MASUCCIO, Natale, 7
MENDOZA Y Roxas y Sandoval, Roderico Viceré, (vidu MENDOZA)
MENDOZA, Roderico, 29
MILANTI, Cristoforo, 5, 10, 18
MILANTI, Giuseppe, 7, 16
MILANTI, Leonardo, 18
MINGO, Mons, Corrado, 38
MISTERI (Sacri Gruppi), 20
MONASTERO della Badia Grande, 26
MONGIARDINO, Mariano, 7
MORABITI, Ignazio, 7
MUSEO Diocesano, 32
MUSEO Regionale "Agostino Pepoli", 2, 14, 15, 18, 32, 36

NAPOLI, Giuseppe, Jr. (Francescano), 18
NAPOLI, Giuseppe Sr., 18
NAPOLI di Omodei, donna Maria, 5
NASI, Nunzio, 15
NETTUNO, 16, 28
NICCOLO' IV (Papa), 18
NICODEMO, 22
NOLFO, Antonio, 3, 11
NOLFO, Domenico, 12, 35
NOLFO, Francesco, 16, 36
NOLFO, Giuseppe, 6
NOTO, Onofrio, 6
NOVELLI, Pietro, 7, 10, 13

ORDINE dei Frati Minori dei Cappuccini, 18
ORDINE dei Gesuiti, 7
ORDINE di Sant'Ignazio di Loyola, 7
ORLANDO, Alberto, 19, 20
ORLANDO, Pietro, 7, 9, 13, 18, 36
OSPEDALE dei Catalani (vidu OSPEDALE di Sant'Angelo)
OSPEDALE di Sant'Angelo (de' Catalani), 10

PAOLINI (Padri), 21
PENNISI, Antonio, 35
PEPE, Giacomo, 10
PIETRO III d'Aragona, il Grande, 16
PIGNATELLI, Camillo, 29
PINNA, ing. Francesco, 7
PIO VII (Papa), 7
PIO XII (Papa), 36
PIRANESI, Giovan Battista, 15
PISANO, Nicola, 36
PISANO, Nino, 36
POLIZZI, Giuseppe, 15
PORTA Felice (del Carmine), 9
PROVENZANO, Marcello, 16

QUARTIERE "Casalicchio" (di San Pietro), 14

RAFFAELE (Arcangelo), 13
RAITI, Mons. Francesco, 36
RAVIDA', Giacomo, 25
REGGENZA Fanali della Marina Militare, 17
RELIGIOSE del Terzo Ordine Francescano, 26, 27
RICCERI, Mons. Francesco, 6, 34, 35
RINAUDO, Arch. Carmela, 6
RIPA (Famiglia), 34
RIZZO, Girolamo, 6
RIZZO, Paolo, 31
RUFFATTI (Ditta, Padova), 6
RUFFINI, Mons. Ernesto, 36
RUGGERO II d'Altavilla, il Normanno, 16

SALESIANI (Padri), 33
SAN BIAGIO, 32
SAN BONAVENTURA, 19
SAN DIEGO, 14
SAN DOMENICO, 10, 14, 18
SAN FRANCESCO d'Assisi, 14, 18, 34
SAN FRANCESCO di Paola, 6, 21
SAN FRANCESCO Saverio, 7
SAN GAETANO, 9
SAN GENEROSO, 24
SAN GIORGIO, 6
SAN GIOVANNI Crisostomo, 19
SAN GIROLAMO, 19
SAN GIUSEPPE, 11, 36
SAN GREGORIO Magno, 19
SAN LIBERALE, 4
SAN LORENZO, 6
SAN NICOLO', 28
SAN NICOLO' da Tolentino, 13
SAN PAOLO, 16
SAN PIETRO, 16, 28
SAN TOMMASO d'Aquino, 10, 19
SANSEVERINO, Bartolomeo, 7
SANT'AGOSTINO, 13, 15, 19
SANT'AMBROGIO, 19
SANT'ANASTASIO, 19
SANT'ANDREA, 16
SANT'ANNA, 34
SANT'ANTONIO di Padova, 18
SANT'ELIA, 36
SANT'IGNAZIO di Loyola, 7
SANT'ORSOLA, 35
SANTA CATERINA, 10
SANTA LUCIA, 3
SANTA MARIA del Monte Carmelo, 9
SANTA MARIA dell'Itria, 13
SANTA RITA, 13
SANTO STEFANO, 6
SANTORO, Matteo (Canonico), 34
SANTUARIO dell'Annunziata, 9, 12, 17, 35, 36
SCONTRINO, Antonio, 15
SERPOTTA, Giacomo, 7
SIRACUSA, Federico, 10, 32
SISTO IV (Papa), 18
SISTO V (Papa), 18
SPINOLA, Mons. Giovanni Domenico, 7
STAITI, Giacomo, 14

TAGLIAVINA BURGIO-DE VINCENZI, Caterina, 29
TARTAGLIA, Giuseppe, 3, 9
TARTAGLIO, Giacomo, 6, 9, 21, 28
TEMPIO di San Domenico, 22
TEOBALDO II di Navarra, 22
TESEI, Ennio, 6
TIPA (Bottega), 32
TIPA, Alberto, 9, 12, 13
TIPA, Andrea, 13, 28
TORRE di Ligny, 4

Van DYCK, Antoon, 6
VENTO (Famiglia), 6
VESPRI SICILIANI, 16

ZICHICHI, Giuseppe (Canonico), 33, 34



Jakobeto Martinez naskiĝinta en Trapani la 7an de januaro 1949, eklernis Esperanton kiam, en la jaro 1965, prof. Nunzjo Parisi, lia instruisto pri Taipado ĉe la Ŝtata Komerca Instituo Profesia kaj Estro de la Esperanta Katedro de Trapani, gvidis unagradan kurson informacele ĉe la Klasika Liceo "Leonardo Ximenes" de Trapani.
En Udino ekde la jaro 1969 kiel Artileria Suboficiro, li reprenis la 9an de novembro 1981 la studadon de la Internacia Lingvo partoprenante en la 2agrada kurso ĉe la Udine'a grupo Nova Espero Friuli, ĵus fondita, kaj tuj li integriĝis en la interna vivo de la sama grupo, supreninte la taskon kiel Kasisto kaj poste Sekretario, partoprenante en la aktivecoj kja gvidante kursojn.
En la jaro 1992 li sukcesis en la 3agrada ekzameno por instrui Esperanton kaj en la jaro 1996, okaze de la kunveno en Feraro (65ª Itala Esperanto-Kongreso, 24 - 30 aŭgusto), oni nomumis lin "Ordinara Membro" de la Itala Esperanto-Instituto. De la jaro 2001 li estas Estro de la Udine'a Esperanto-Katedro.
Krom esti en korespondado kun multe da eksterlandaj geesperantistoj, li klopodis pri la serĉado de la italaj Z.E.O.-j favore de s.ro Raymondo Borè de Chambéry.
Plie li klopodis por ordigi kaj inventari la esperantan bibliotecon, kiu estis en la Paulet-a kelo (ĉirkaŭ 3.500 volumoj el ĉirkaŭ 500 verkoj), kaj ordigi la korespondaĵon de kav. Paolet.
Liaj artikolojn estas eldonitaj sur la revuo "Ĉirkoli Aziendali" - Firmaj Kluboj de la Fervojista Postlaboro de Udino (nun "Cronaca e Cultura" - Kronako kaj Kulturo, Revuo de la Asocio D.L.F. de Udino).
Memorante siajn originojn, li klopodis pri la kompilado de skriboj pri Trapani kaj Sicilio, analoge al tiuj pri Udino kaj Friulo.

Li kompilis:
- *Biografiaj sciigoj pri Stefano kaj Nikolao La Kolla - Sciigoj pri la Grupo Siĉilja Esperanto-Klubo "Stefano La Kolla"* (1987);
- *Pastro Jakobo Biankini kaj Esperanto* kune kun prof. Johano Strasiotto (2005);
- *Cent jaroj de Esperanto en Triesto,* kune kun la T.E.A. (2008).

Plie li kompilis:
- *Esperantismo en Friulo* (ne eldonita);
- *Esperantismo en Sicilio* (ne eldonita);
- *Monumentoj kaj memorŝtonoj en la urbo Udino kun biografiaj kaj historiaj sciigoj* (ne eldonita);
- *Monumentoj kaj memorŝtonoj en la urbo Trapani kun biografiaj kaj historiaj sciigoj* (ne eldonita);
- *Palacoj en la urbo Udino kun mallongaj priskribaj sciigoj* (ne eldonita);
- *Palacoj en la urbo Trapani kun mallongaj priskribaj sciigoj* (ne eldonita*);*
- *Preĝejoj en la urbo Udino kun mallongaj priskribaj sciigoj* (ne eldonita*).*

En la libro *Cent Udine'anoj rakontas 3* de Mario Blasoni (La Nuova Base Eldonejo, Udino, 2007, paĝoj 61 – 63) estas raportita la artikolo aperita sur "Messaggero Veneto" de la 11a de julio 2005.